



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 220

Aŭgusto 2004

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado aŭ Usono estas ankoraŭ \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

UNIVERSALA KONGRESO AKADIA 2004

Miloj da akadianoj el atlantika Kanado, Luiziano en Usono, kaj aliloke kunvenas ĉi aŭguste en ĉiu parto de la provinco de Nova Skotio por partopreni la Universalan Kongreson Akadian 2004. Oni aŭdas prelegojn, aŭskultas muzikon, renkontas amikojn kaj familianojn kaj mergas sin en la franclingva akadia kulturo. Oni festas la kvarcentjaran datrevenon de akadianoj, kiuj unue venis de Francio dum la jaro 1604 por ekkomenci la francan enloĝadon de la nova mondo en la tiama Akadio, nuntempe Nova Skotio. Dum la sekvinta jarcento kaj duono, ili kultivis riĉan agrikulturon, kaj eĉ regajnis terpecojn de la maro per digoj. Tamen, en la jaro 1755, politikaj maltrankviliĝoj pro la militoj inter Anglio kaj Francio rezultis en granda elpelo de la tuta popolo for de la regiono fare de la angloj. Multaj akadianoj finfine revenis, sed plejparte ili devis ekloĝi en aliaj, malpli valoraj lokoj kie ili plejparte fiŝkaptis. Multaj aliaj restis en la diasporo. Kongresoj kiel la ĉi monata estas bonegaj oportunoj por lerni pri kaj renkonti disvastigitajn familianojn kaj ĝui la akadian kulturon.

Tiun kulturon oni retenis malgraŭ la pli forta influo de la angla kulturo en ĉi tiu regiono. La akadia lingvo fariĝis interesa miksaĵo de malnova franca kaj pli modernaj anglismoj, sed oni malpli multe taksis ĝin valora kiel bonan francan lingvon en la lerneja sistemo. Oni devis eĉ demandi, ĉu la kulturo povus daŭri aŭ supervivi sian propran asimiliĝon. Interese, iuj separatistoj de Kebekio traktas Akadion

kiel ekzemplon de kulturo, kiu perdas sin en pli granda kaj pli domina kulturo. Tamen, oni multe strebis por enkonduki franclingvan instruadon en la provinco, kaj nuntempe oni rajtas ricevi edukon en lernejoj kiel la halifaksa franclingva altlernejo „Carrefour du Grand Havre” (grand-havena krucvojo). La nuntempe florantaj literaturo kaj muziko de Akadio pruvas, ke la kulturo vivas kaj ne stagnas en arkiveja kelo. Tion oni ankaŭ vidas en la tuta provinco dum ĉi tiu kongreso.

— Bob Williamson

INTELIGENTECO

Vi imagas, ke vi estas inteligenta. Tamen, vi tute ne estas. Eĉ ne povas esti. Vi estas nur homo, unu el la duonbestoj. Ĉu vi povas snufi arakidon kaj tuj konstati kiom da nuksoj estas en la ŝelo, kiom ili aĝas, ĉu ili bongustos? Ne. Ĉu vi povas ekrigardi arbaron kaj tuj vidi la vojojn? Ĉu vi eĉ komprenas kiel oni povas kuri laŭ la branĉoj por kaŝi nuksojn kaj samtempe trompi la bluajn garolojn pri la vera kaŝejo? Ĉu vi scias kiel ŝirmi vin, esti ĉiam kontraŭflanke de branĉo, por eviti bekon de korvo? Aŭ precize kiel salti por eskapi la ungegojn de akcipitro? Ne. Via tiel nomata ‘cerbo’ ne estas organizita por efike funkcii pri gravaj aferoj. Ne estas via kulpo: Dio kreis la vivantojn, kaj Ŝi apartigis la bestojn de la duonbestoj.

La veraj bestoj povas pensi. Katoj almenaŭ pensas, eĉ se la pensoj estas satanaj. Katoj povas grimpi (tamen ne lerte) kaj rapide moviĝi, kaj ili scias kiel ĉasi per celo kaj pacienco. Procionoj povas grimpi kaj trovi ĉion por satigi la apetiton (ofte iom strangan) — jen veraj bestoj. Homoj kaj bovoj estas nur duonbestoj kiuj vagas malrapide sur la tero — ankaŭ hundoj (kvankam ili estas danĝeraj kaj terure bruoplenaj). Tiuj ne povas flare distingi inter diversspecaj semoj. Tiuj ne akumulas nuksojn, eble eĉ ne konscias pri estonta vintro. Imagu!

Mi konsilas al vi: forgesu vian orgojlon; cedu vian ŝajnegon pri inteligenteco. Akceptu, ke vi estas nur homo. Estu kontenta admiri la verajn bestojn, kiuj lerte ordigas la gravajn aferojn de la vivo.

Kaj ĉiumatene elmetu ekster via domo kelkajn ternuksojn kaj heliantsemojn por vidi kaj ĝui la farojn de realaj inteligentuloj.



— Steĉjo

DEFIO PRI TRADUKADO

Pro mem-defio, mi kutime strebas traduki poemojn, kantojn, ktp, kun ĝuste la samaj

*Rimoj KAJ

*Ritmoj KAJ

*Silaboj KAJ

*Akcentado KAJ

*Senco

de la [anglaj] originaloj. Estas malfacila, precipe pro la „-n” regulo de rekta objekto, kiu klinas kontraŭ la ebleco forigi la literon „-o”. Tial oni ofte ne povas uzi la saman verbon kaj rektan objekton, kaj samtempe konservi la akcentadon. Jen eta ekzerco, kiu malgraŭe plenumas ĉiujn de tiuj punktoj:

LA ANGLA ORIGINALO de Ogden Nash:

THE FLY
God in his wisdom made the fly
And then forgot to tell us why.

Ĉi tiel la akcentoj:
/ - - / - / - /
- / - / - / - /

ESPERANTO, PROVO 1: Traduko de Gene Keyes

LA MUŜ'
Saĝe el Di' aperis muŝ'
Sed sen kial' de tia fuŝ'.

ESPERANTO, PROVO 2: Traduko de Mary Jo Graça [la "plej bona", laŭ ŝia humila opinio]

LA MUŜ'
Per Dia vort' kreiĝis muŝ'
Sed al ni tio ŝajnas fuŝ'.

ESPERANTO, PROVO 3: [Re-traduko de Gene, eĉ pli bona, laŭ lia humila opinio; rimarku la ĝustan akcenton de la dua silabo]

LA MUŜ'
Saĝe el Di' kreiĝis muŝ',
Sed sen kial' de tia fuŝ'.

ESPERANTO, PROVO 4: [Nova traduko de Gene, ju pli polurita, des pli proksima al la originala senco]

LA MUŜ'

Muŝon tre saĝe kreis Di'

Sed sen eksplik' al ni pro ki'.

Nu, karaj gelegantoj, la defio pluas: verku pli bonan tradukon, laŭ la supraj kondiĉoj, de „La Muŝ'”, au io simila . . .

— Gene Keyes

Noto de la redaktoro: Mi dankas al Gene pro lia klopodo precize traduki. Kiam oni tradukas la vortojn de kantoj, kiel ofte faras Gene, oni certe devas ankaŭ zorgi pri la ritmo de la muziko. Tamen klare montriĝas, kiel malfacile estas traduki laŭ ĉiuj el tiuj severaj kondiĉoj. Estas kelkaj malklaraj signifoj en la unuaj klopodoj; ekzemple, el kiu parto de Di' aperis la muŝo (el la buŝo?) kaj kial la muŝo estis tiel saĝa? Eĉ la lasta versio uzas la vorteton „ki'”, vortofragmento sensignifa. Se Gene uzus la plenajn vortojn "Dio" kaj "pri tio", kaj eĉ „ekspliko”, li ne povus konservi la precizan ritmon de la alilingva originalo, sed oni multe pli facile povus kompreni la signifon. Tio laŭ mi estas la ĉefa afero. Oni ne devas konservi elementojn, kiuj apartenas nur al la originala lingvo, por traduki en alian lingvon. Oni eĉ devas strebi por uzi la plej bonajn esprimojn kaj stilon de la nova lingvo. Laŭ Zamenhof, ekzemple, „naciajn idiotismojn ni devas eviti kaj peni traduki ilian sencon en maniero plej logika kaj internacia.” Tamen, la defio de Gene povas esti amuza kaj pensiga afero. Kion vi opinias?

Lastatempe Aŭdita En Radio Polonia

„Novskotia *Inter Ni* (en majo 2004) starigas interesan demandon, „De kie venas vojokavoj?” Ĝis antaŭnelonge tiu ĉi praktika demando estis ankaŭ mia, ĉar ĝuste multaj vojokavoj estis tio, kion mi vidis, rigardante alstrate tra la fenestro de mia ĉambro. Tamen iun tagon venis neesperantistaj fakuloj kun maŝinoj kaj faris praktikan servon: metis novan, glatan asfalto-surfakon. Do, kvankam videble kiel esperantistoj, ankaŭ koncerne vojokavojn ni estas en la fazo de diskut-komenco, dum praktikajn servojn faras aliaj.”

— Wojtek Usakiewicz,
Radio Polonia,
Trarigardo de la E-gazetaro,
13.07.2004